
# Kajeroj el la Sudo

*Bulteno de Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj*

http://www.gazetoteko.eu/hale/k76.pdf




N[ro] 76[a] Marto/aprilo de 2008

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*

**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto nº 2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 10 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: Oskar Vildo verkis tre belajn rakontojn. Ni prezentas unu el ili en paĝo 9-a.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Jorge Pavón,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Vytautas Ŝilas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Enhavo

Redaktore ........ 3
Parolas la Prezidanto ........ 4
Okaze de balotado ........ 5
Kurso pri informadiko ........ 7
La Juna Reĝo ........ 9
La Faraono, ĉapitro 22ª ........ 19

Redaktore


# La devo

*Post kelkaj tagoj post la ricevo de nia magazino, hispanoj estos esperataj ĉe balotejo por elekti novan parlamenton. Mi memorigu al vi, ke **nevoĉdonado** estas ankaŭ rajto. Poste ni sekvu nian korinklinon por la bono de nia kuncivitanaro, kies grava parto estas ni mem.*

*Sed ni legu ankaŭ pri la problemoj de Juna Reĝo, de Faraono kaj pri la Kurso pri Informadiko, kiun ni komencas per ĉi tiu numero de **Kajeroj el la Sudo**.*

*Elkore salutas,*


*Jesuo*



## Parolas la Prezidanto

***Estimataj haleanoj!***

***Hispanio faros demokration en Marto kiam la popolo voĉdonos. Vi povas legi artikolon de Jesuo parolante pri nia demokratio, kiu ne estas plena demokratio.***



***Kiu faros la demokration? La respondo estas simpla: demokratio venos kun maldekstro, kiam la partio de maldekstro fariĝos demokrata.***

***En la pasintaj jaroj la granda partio de maldekstro perdis la ŝancon kiam ĝi nuligis la balotadon de siaj anoj kiam ili elektis Sr-on Borrel kaj la nomeklaturo de la partio elektis S-ron Almunia. La partio estis ne fidela.***

***Same kiel la partio de maldestro ne estis fidela, la granda partio de dekstro estis fidela al sia mastro kiam José María Aznar elektis sian heredonton, je la sama maniero kiel oni faris en Frankismo.***

***La artikolo de Jesuo priskribas la necesan celon de plenplena demokratio.***

***Oscar Wilde estis intelektulo de la angla nacio. Li estis mirinda verkisto kaj kune kun Aldous Huxley kaj Georgo Orwell, mi opinias, ke ili estas la triopo da grandaj intelektuloj de Britio.***

***Kaj finfine ni legos la 22-an ĉapitron de la granda verko de Prus, La Faraono, vera antologio de lukto por povo.***

***En tiu ĉi numero vi havas tre gravajn tekstojn: artikolon pri politiko (multaj samideanoj eble kritikos ĝin kiam ili legos ĝin), rakonto de Oscar Wilde kaj finfine ĉapitro de La Faraono.***

***Mi esperas vian kritikadon.***

*Juan Antonio*

Fermante nian eldonon, ni eklernis, ke la fama verkisto kaj esperantisto Claude Piron ĵus mortis. Ni ege bedaŭras la aferon, kaj kondolencas lian familion pro la malgaja evento. Li ĉiam vivos ĉe ni, ĉiun fojon, kiam esperantisto legos liajn abundajn, belajn kaj interesajn verkojn, kiel ***Gerda Malaperis*** aŭ ***La defio de lingvoj.***




# Okaze de balotado

Post kelkaj tagoj, la 9-an de marto, oni petos al komuna civitano hispana, ke li aŭ ŝi honeste balotu por la plej konvena, laŭ sia eltrovo, partio, kiu regos Hispanion dum la venontaj kvar jaroj.

Tio estas kutimo ekde 1978, kie oni voĉdonis kaj akceptis la regantan Konstitucion, kiu finis kvardek jaroj da diktatoreco kaj nelibereco. Mi memoras, ke tiu balotado estis emocia kaj esperiga, ĉar plej multe da hispanoj voĉdonis unuafoje en niaj vivoj. Ni kredis, ke temis pri demokratio.

Bedaŭrinde, ne pri tio temas. Demokratio estas regado de la popolo. Sed en Hispanio, same kiel en aliaj landoj, ne la popolo, sed politikaj partioj regas. Oni povas trovi mian aserton troiga, sed ne ŝajnas, ke nomumante la kandidatojn, kiuj estos en sia listo, politikaj partioj konsultis la popolon. Nur siajn anojn, kaj ofte ne ĉiujn. Veras, ke socialisma partio PSOE alvokas anojn en kongreson, kaj tiel oni diskutas kaj voĉdonas, sed..., kio okazis pri S-ro Borrell, kaj kial li estis devigita demisii? En dekstra partio PP aferoj estas eĉ pli maldemokrataj: mi neniam forgesos, ke oni ne sciis kiun elektos Prezidento Jozefo María Aznar kiel sian *heredonton*. Aliflanke, el la listo prezentata de la diversaj politikaj partioj, oni ne rajtas elekti libere tiun kandidaton, kiun oni prifidas: oni voĉdonas la tuton, kaj estas la koncerna partio tiu, kiu decidas en kiu ordo la diversaj kandidatoj aperas, tiel, ke por ke la lasta kandidato estu elektita, ĉiuj antaŭuloj en la listo estas unue elektitaj. Do, ne demokratio, sed partikratio ekzistas en Hispanio.

Sed aferoj povas esti pli malbonaj, kaj ili ja estas tiel: rekomendis Montesquieu, franca pensisto, ke en demokratio estu tri sendependaj povoj: leĝfaristoj, ekzekutivistoj, kaj juĝistoj. Oni povas argumenti, ke en Hispanio demokratio ankaŭ ne ekzistas, ĉar la diversaj registaroj *demokrataj* sukcesis kontroli juĝantaron per elektado de la plej altaj postenoj por juĝistoj, el kie ili kontrolas ĉiujn aliajn juĝistojn en Hispanio: Konsilantaro de la Povo Juĝa. Nu, ne mi insistos pri tio; sed eĉ mi asertas, ke tio ne estas tiom grava, kiom la pli nuda fakto, ke **pro la Konstitucio de 1978 mem** estas la leĝofaristoj (Congreso de los Diputados) tiu, kiuj elektas la ekzekutivistojn, nome la registaron. Surpapere, almenaŭ, la registaro ŝuldas sian postenon al Parlamento, kaj pro tio ĝi ne estas sendependa el ĝi. Ververe, okazas inverse: la Prezidento estas ĉiam la plej influa homo en la partio, kaj sekve situigas homojn lojalajn al si en la partilisto, kaj kiam ili estas deputitoj, ili elektas lin kiel prezidenton. Do, leĝofaristoj kaj registaro estas tuto nesendependa inter ili, kaj sekve demokratio neniam ekzistis en Hispanio de kiam la Konstitucio de 1978 aperis; kio estas same kiel diri, ke demokratio neniam ekzistis en Hispanio, bedaŭrinde. Partioj politikaj forrabis ĝin dum ni, stul-





ta popolo, aplaŭdis pro tio, ke ni ne plu suferis diktatoron. Ni suferas diktatorecon de partioj laŭleĝe, sed male al tio, kion ni faris dum la Diktatoreco, ni estas feliĉaj pri tio, kaj nek kritikas ĝin, nek ni primokas ĝin, kiel ni faris pri la Diktatoro Fransisko Franko.

Sed kion faris Fransisko Franko por Hispanio? Kion faris *demokratio* por Hispanio? Kio diable estas Hispanio?

Dum mia kara infaneco mi aŭdis, ke Hispanio estis la Diktatoro, nia tradicio, nia kulturo, nia lingvo, nia lando, kaj tiel plu. Sed ni konsentu, se ni povas, ke Hispanio hodiaŭa estas la loko, kie ni vivas, kaj ni mem, la hispanoj. Jes, mi scias, ke multe da hispanoj neas, ke ili estas hispanoj, sed tio estu alia diskuto.

Se Hispanio estas la loko, kiun oni vidas en mapoj sub la nomo «Hispanio», kaj la homoj, kiuj loĝas tie, ni povas interkonsenti, ke promocii plibonfarton al homoj, kiuj vivas ĉi tie, estas progreso. Do, se oni faras aferojn, kiuj pligrandigas tiun progreson en la vivokondiĉoj de hispanoj, oni faras ion por Hispanio.

Fransisko Franko organizis kaj farigis multe da rezervujajn lagojn por konservi akvon en seka lando kiel Hispanio, kie ne tiom multe pluvas. Ankaŭ li ordonis ekzekuti laborojn por transverŝigi akvo el riverbaseno al riverbaseno de Hispanio. La plano venis el registaro de la Dua Respubliko, sed li ne pro tio malestimis ĝin. Pro tio kaŭzas surprizon malagrablan, ke registaroj de *demokratio* —ĉiuj ĝis nun— neglektis tiun interesan politikon konstrui rezervujojn kaj migrigi akvon de parto de Hispanio kie ekzistas pli ol siufiĉe al parto de Hispanio kie akvo mankas.

Nun, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon, ĉiu politikisto en Hispanio petas voĉdonon por sia partio. Ni ne devas fari tion. Ni donu nian voĉon al Hispanio. Al tiu homo, kiu faros ion utilan por Hispanio. Ne por tiuj, kiuj faros ion utilan nur por partio sia. Ĉar Hispanio ne estas partio, sed tuto. Ni ĉiuj hispanoj havas la samajn rajtojn kia ajn nia politika emo estu. La nova prezidento ne estos prezidento por partio sia, sed por la tuta hispanaro.

Dum la lasta jarokvaro Hispanio malriĉiĝis. La nuna registaro eĉ ne agnoskas, ke kiam ili venis en povon, la trezoro de la nacio estis plenplena. Sed ili mensogas. Ili nun diras, ke la ekonomio hispana bonfartas. Sed ni vidas, ke la kosto de la vivo estas multe pli alta ol antaŭe. La nuna registaro diras, ke ili plenumis ĉion, kion ili promesis. Sed mi ne vidas, ke maldungo malkreskis. Mi ne vidas, ke ĉiu hispano havas dignan hejmon. Mi ne vidas, ke niaj



rilatoj kun aliaj civilizaj landoj estas pli bonaj. Kiam ĉi tiu registaro komencis labori, ni estis alianculoj de la plej povaj landoj en la mondo. Nun, kiam ili finas sian periodon, ni estas amikoj de ne tiom povaj landoj, Venezuelo, Maroko kaj Kubo, anstataŭ Usono, Britio kaj Germanio. La plej pova prezidento el la mondo vespermanĝis kun la antaŭa prezidento de Hispanio, sed ĉi tiun li ne ricevas. Sed ni havas *Aliancon da Civilizacioj*, samseksan edziĝon kaj preskaŭ liberan aborton. Kaj pli malplenajn poŝojn. Do, ĉifoje mi ne plu voĉdonos per mia koro. Mi voĉdonos per mia poŝo. Se multaj kuncivitanoj miaj faras same, eble ni ne malsatos morgaŭ.

# Kurso pri Informadiko

Antaŭ kelkaj jaroj samideano diris al mi, ke oni devas publikigi en nia magazino kurson pri informadiko, ĉar ĝi tiom multe influas niajn vivojn, kaj multaj inter ni uzas komputilojn ĉiutage cele al multaj aferoj, kiujn oni povus resumi kiel *interkonatiĝon kaj interrilaton dise tra la mondo*. Jes, ni uzas Interreton, ĉar ĝi estas efika, rapida kaj malmultekosta; sed estas tre malfacile, se eble, uzi ĝin sen komputilo.

Multaj samideanoj demandas al mi pri tio, kion oni devas koni antaŭ aĉeti komputilon. Mi ĉiam asertas same: daktilografion. Oni devas scii kiel uzi klavaron. Kompreneble, oni povas uzi klavaron per nur du aŭ kvar fingroj, kaj tiel komenci rekte komputili. Sed mi tion malkonsilas forte: se oni *perdas* kelkajn horojn aŭ eĉ semajnojn, lernante kiel uzi la tutan klavaron per niaj tutaj dek fingroj, oni ŝparos multe da tempo en nia restanta vivo. Kaj oni eraros multe malpli, ankaŭ.

Per la kurso, kiun mi komencas verki hodiaŭ, se miaj sano kaj vivo daŭras sufiĉe, oni lernos kiel uzi komputilon cele al nia afero. Kompreneble, oni povas uzi ĝin por ĉiu ajn alia celo, sed mia celo tion ĉi verkante estas klarigi kiel oni povas uzi komputilon por bone rilati al iu ajn en la mondo. Ĉu oni vere faras tion bone kaj efike dependas, kompreneble, el ĉiu homo. Sed mi klarigos konceptojn kaj procedojn fari tion.

Komputiloj ekzistas de pli ol jarcento, sed nur post la lastjarcentaj okdekaj jaroj ili estis sufiĉe malmultekostaj por ke simplaj homoj povos permesi al si aĉeti ilin kaj fari ion kun ili. Mi memoras kelkajn nomojn kvazaŭ sciencfikciaj: XZ81, Spectrum, Amstrad..., fakte mi aĉetis la duan kaj la trian, kaj mi elspezis multe da tempo penante kompreni kiel fari ion utilan per ili. Kontraŭ 300 eŭroj oni povis aĉeti Spectrum, kiu enhavis 16 kilobajtojn da memoro, kaj kies programojn oni devis ŝarĝi el kaj en modestan rubanregistrilon. Tio estis teda procedo, kiu eksmodiĝis tuj kiam venis Amstrad, kiu jam havis diskedon kun 178 kilobajtoj sur ĉiu flanko. Poste venis multe da aliaj maŝinoj, kaj nun ni havas multe pli povajn kaj mirindajn komputilojn kontraŭ la samaj 300 eŭroj. Sed ne pri maŝinoj parolu mi. Mi promesis, ke ni lernos kiel uzi komputilojn, kaj tio ja sufiĉu.

Komputilo estas inerta objekto. Ĝi faras nenion per si mem. Oni devas diri al komputilo kion fari, kaj —plej grave— kiel fari ĝin. Komputilo estas fakte nur granda kaj pova kalkulilo: ĝi povas nur aldoni ciferojn. Grandajn ciferojn. Rapide. Sed ĝi nur faras tion. Ni devas diri al ili kiujn ciferojn ili devas aldoni. La rezulton oni povas traduki en multajn aferojn, kiel bildigi imagon, produkti sonon, eĉ filmon, kaj tiel plu. Ni povas fari ĉiun operacion unu post la alia, sed tio estus tre teda, kaj por tio ni devus lerni la lingvon de komputiloj, kies eroj estas nur du: 0 kaj 1.

Sed ekzistas homoj, kiuj studis tiun lingvon, kaj kreis diversajn aliajn *lingvojn* per kiuj oni povas tajpi per *homa lingvo*, kiel la hispana, la angla, eĉ per Esperanto, kaj tiu *lingvo* povas diri al komputilo kiel kaj kion fari per la *ducifera lingvo*. Ene de tiuj *lingvoj*, nomumitaj *de alta nivelo*, ekzistas aroj da ordonoj kies celo estas difinita tasko, kiel ekzemple produkti legotan dokumenton, kiel ĉi tiun artikolon, ekzemple, kaj ni konas tiujn

specifajn ordonaron kiel *programojn*. La programon per kiu oni produktas tekstojn, oni konas kiel *Tekstprilaborilon*, kaj la plej konata el ili hodiaŭ estas Word (vorto) de la firmao MicroSoft. Tamen, ekzistas aliaj, pli bonaj, tekstprilaboriloj, kaj ni pristudos unu el ili.

Sed la plej grava programo, tiu al kiu tekstprilaboriloj kaj aliaj ĉiuj programoj rilatas por ke ĝi diru la taskon al komputilo, estas konita per la nomo *Operacia Sistemo*. Fakte ĝi konsistas el aro da plej simplaj ordonoj, kiel printu, kopiu, forviŝu kaj tiel multe plu. Denove ekzistas kelkaj —ne ekzakte multaj— operaciaj sistemoj. La plej fama estas Windows (fenestroj), kiun inventis la plej riĉa homo el la mondo hodiaŭa. Sed ekzistas aliaj, inter ili MsDOS, OS/2, MacOs, FreeDOS, DRDOS, Solaris, BSD, PC/M, Unix, kaj Linux.

Mi elektis la lastan por klarigi tion, kiel komputilo funkcias, kaj kion oni povas fari per ĝi, pro tre klaraj kialoj:

—Ĝi estas tute senpaga.
—Ĝi estas facile ekhavebla.
—Ĝi estas regule ĝisdatigata.

Ekzistas diversaj distribuadoj da Linukso, laŭ la kvanto kaj emo de la inkluzivitaj programoj provizitaj en la disko mem. Inter ili, la plej famaj estas Debian, Mandriva, Suse, Knoppix kaj Ubuntu. La dua lasta estas fama ĉar oni povas uzi ĝin el la diskolegilo, sen instali ĝin. La lastan oni ankaŭ povas uzi tiel, sed ankaŭ oni povas instali ĝin en la diskon malmolan, kaj profiti ĝiajn bonojn plenplene. Inter ili estas du ĝisdatiĝoj jaraj, je aprilo kaj oktobro, kiuj estas provizitaj de firmao Canonical Ltd.

Ekhavi la operativan sistemon estas simple:

1 Petu senpagan KD-n al https://shipit.ubuntu.com/. Vi ricevos bele printitan diskon por provi aŭ instali la sistemon, sed vi povas devi atendi multe, ĝis 6 semajnoj.

2 Vi povas aĉeti magazinon, kiu enhavas senpagan KD-n kun tiu ĉi sistemo.

3 Vi povas elŝuti la dosieron ubuntu-710-desktop-i386.iso el retadreso http://www.ubuntu.com/getubuntu. Ĝi havas 695 megojn, sed la tempo elŝuti ĝin estas evidente malpli ol ses semajnoj. Fakte unu horo, pli-malpli.

4 Vi povas uzi la ĉi-kunan diskon por provi aŭ instali la sistemon en via komputilo.

Se vi elektis la trian manieron, sciu, ke el la dosiero vi devas *bruli* kompaktan diskon per diskofarilo, kiel Nero aŭ simila programo. Kiam vi jam havas ĝin, vi instruu vian komputilon por ke ĝi startu vian maŝinon el la legilo por kompaktodiskoj, kaj post kelkaj sekundoj vi vidos ekranon kie oni atendos kelke da sekundoj por ke vi diru, kiel vi deziras, ke la programo komencos. Premu F2 kaj elektu *Spanish*. Post kelkaj minutoj, vi povos uzi Linukson kaj ĝiajn multajn programojn. Mi gvidos vin tra ili la venontan monatoduon.



# La juna reĝo.

*de Oskar Vildo.*

La nokton antaŭ la tago fiksita por sia kronado, la juna reĝo sidis sole en sia bela ĉambro.

Liaj korteganoj estis ĉiuj forirantaj, klinante siajn kapojn preskaŭ ĝisplanke, laŭ la ceremonia kutimo de tiu tempo., kaj ili estis irintaj al Granda Halo de la Palaco ricevi la lastajn lecionojn de la Instruisto pri Etikedo; ĉar estis ankoraŭ tiom multe da ili, kiuj havis tre naturajn manierojn, kio estas en kortegano, mi apenaŭ devas diri, tre grava ofendo.

La knabo, —ĉar li estis nur knabo mesesdekjaraĝa— ne bedaŭris ilian foriron, kaj estis fluginta denove kun profunda sopiro ripoziĝa en la molajn kusenojn de sia bele kudrita sofao, kuŝante tie kun sovaĝaj okuloj kaj malfermita buŝo, kvazaŭ Faŭno foresta, aŭ juna besto arbaraĵus fuĝinte ĉasistojn.



Kaj, evidente, temis pri ĉasistoj, kiuj estis trovintaj lin, trovintaj lin preskaŭ hazarde kiam li, senŝue kaj kun fluto en sia mano, sekvis la ŝafaron de la kompatinda kapristo, kiu edukis lin kaj kies filo li ĉiam kredis esti.

La infano de la ununura filino de la maljuna reĝo laŭ sekreta geedziĝo kun ulo tre malalte al ŝia situacio —strangulo, kelkaj diris, kiu tra la magia miro de sia liutoludado amiĝis de la juna princino, dum aliaj parolis pri artisto de Rimini kiun la princino estis montrinta multan, eble tro multan honoron kaj kiu estis malaperinta subite el la urbo, lasante sian laboron ĉe la katedralo nefinita. Li estis rabita de la flanko de sia patrino kiam li estis nur unu semajno aĝa, dum ŝi dormis, kaj donita al zorgo de komuna kamparano kaj edzino, kiuj ne havis infanojn kaj vivis en fora parto de arbaro, pli fora ol unu tagorajdo per ĉevalo el la urbo. Doloro, aŭ pesto, kiel la korta kuracisto deklaris, aŭ, kiel kelkaj proponis, itala veneno metita en pokalon da spicita vino, mortigis, en unu horo post ŝia vekiĝo, la blankan knabinon kiu naskis lin, kaj je la momento, kiam la fidela mesaĝisto, kiuj portis la bebon sur sia selo, malsupreniris el sia lacigita ĉevalo kaj frapis la duran pordon de la kabano de la kapristo, la korpo de la princino estis prenata en malferman tombon, kiun oni konstruis en malplena preĝejkorto, preter la pordego de la urbo, tombo kie, oni diris, estis alia korpo, tiu de junulo kun mirinda kaj eksterlanda beleco, kies manoj estis ligitaj malantaŭ li per noditaj kordoj, kaj kies brusto estis kudrita de multaj ruĝaj vundoj.

Tia estis, almenaŭ, la rakonto, kiun homoj flustris unu la aliajn. Vere estis, ke la maljuna reĝo, ĉe sia mortolito, ĉu movigita de rimorso pro sia granda peko, ĉu nur dezirante, ke la reĝlandon prenos ne alia familio, finfine sendis trovi lin kaj, je la ĉeesto de la Konsilantaro, proklamis lin

kiel lian heredonton. Kaj ŝajnas, ke ekde la unuaj momentoj de sia agnosko, li montris strangan pasion por beleco, kiu estis havonta grandan influon sur sian vivon. Tiuj, kiuj akompanis lin al la serio de ĉambroj dediĉitaj al lia servo, parolis ofte pri la krio plezura, kiu rompis liajn lipojn kiam li vidis la delikatajn vestaĵojn kaj riĉajn juvelojn, kiuj estis pretigitaj por li, kaj pri la preskaŭ sovaĝa ĝojo, per kiu li forĵetis sian haŭtan tunikon kaj malmolan ŝafhaŭtan mantelon. Fojfoje mankis al li, certe, la bela libereco de sia arbara vivo, kaj emis froti siajn manojn ĉe tedaj kortceremonioj, kiuj okupis tiom multe da lia ĉiu tago, sed la mirinda palaco —*Ĝoja*, oni nomis ĝin— kies mastro li sin trovis nun, ŝajnis al li esti nova mondo freŝmodelita por lia plezuro; kaj tiom baldaŭ, kiom li povis eskapi el konsilejo aŭ aŭdiencoĉambro, li kuris tra ŝtuparego ornamita per orpentrite bronzaj leonoj kaj ŝtupoj marmoraj, vagadi de ĉambro en ĉambron, el koridoro en koridoron, kiel iu, kiu serĉas en beleco rimedon kontraŭ doloro, specon de resanigo.

En tiuj vojaĝoj de ekkono, kiel li nomumis ilin —kaj fakte ili ŝajnis al li veraj vojaĝoj tra mirinda lando—, li ofte estis akompanita de maldikaj, blondaj kortegaj paĝioj, kun iliaj flugantaj manteloj kaj amuzaj galonoj flustrantaj; sed pli ofte li ŝatis soliĝi, sentante tra rapida instinkto, preskaŭ devinado, ke sekretoj de arto estas plej bone lernitaj en sekreto, kaj ke Beleco, same kiel Saĝeco, amas la solan adoranton.

Multajn kuriozajn rakontojn oni diris pri li dum tiu tempo. Oni diris, ke forta urbestro, kiu venis prelegi retorike nome de siaj urbanoj, ekvidis lin surgenuante, kvazaŭ adorante, antaŭ granda pentraĵo, kiun oni ĵus portis el Venecio, kaj kiu ŝajnis anonci la adoradon de novaj dioj. Alifoje li mankis dum horoj, kaj post longa serĉado oni trovis lin en ĉambreto de norda tureto de la palaco, kiam li observis, kvazaŭ hipnotita, grekan gemon kun la figuro de Adoniso. Oni vidis lin, laŭ la rakonto, premante siajn varmajn lipojn sur marmoran brovon de malnova statuo, kiun oni estis ektrovinta sur planko de rivero kiam



oni konstruis ŝtonan ponton, kaj oni inskribis ĝin sub la nomo de sklavo bitina de Adriano. Li pasintis la tutan nokton studante la efekton de lunlumo sur imago arĝenta de Endimio.

Ĉiu stranga kaj multekosta materialo altiris liajn atenton kaj fascinon, kaj lia avido ekhavi ilin igis lin forsendi multajn komercistojn, kelkajn trafiki por sukceno kun duraj fiŝistoj de la nordaj maroj, kelkajn al Egiptio serĉi la strangan verdan turkison, kiun oni trovas nur en tomboj de reĝoj, kaj kiun oni diras, ke ĝi havas proprecojn magiajn; kelkajn al Persio serĉi tapiŝojn kaj pentritajn potojn; kaj aliajn al Bharato aĉeti gazon kaj eburon kolorigitan, lunŝtonojn kaj braceletojn de jado, santalojn kaj emajlon bluan kaj ŝalojn de delikata lano

Sed tio, kio priokupiĝis lin pleje estis la robo, kiun li devis vesti dum sia kronado, robo de oro teksigita, kaj la krono rubenigita, kaj la povbastono kun ĝiaj vicoj kaj ringoj da perloj. Evidentiĝis, ke li pensis pri tio ĉinokte, kuŝante sur sia luksa sofo, rigardante la grandan pinarban trunkon, kiu bruliĝas ĉe fajrejo.

La desegnojn, faritaj per la manoj de la plej famaj artistoj de tiu tempo, oni sendis al li multajn monatojn antaŭe, kaj li estis ordoninta, ke laboristoj devas senlace tagnokte fari ilin, kaj la tutan mondon oni devas serĉi por tiuj juveloj, kiuj meritos tian laboron. Li vidis sin stari apud alta altaro de katedralo vestita kiel reĝo, kaj rideto pendis el liaj junulaj lipoj, kaj lumiĝis per brila lukso siaj obskuraj arbaraj okuloj.

Post kelke da tempo, li ekstaris el sia sidloko, kaj apogante sin kontraŭ la prilaborita fajrejo, li rigardis la duone lumigita ĉambro. El la muroj pendis riĉaj tapiŝoj, kiuj reprezentas Venko de Beleco. Granda prembildo, farbita kun agato kaj lazurŝtono, plenigis angulon, kaj fronte al fenestro staris strange farbita ŝranko kun paneloj lakaj de pulvigita kaj mozaikigita oro, en kiu oni metis delikatajn blobetojn de vitro venecia, kaj glaso da malklara onikso. Palaj hundetoj estis kudritaj sur la silka koverto de la lito, kvazaŭ ili falis el lacaj manoj de dormo, kaj altaj kanoj de eburo fluteska subtenis la veluran baldakenon, el kiu grandaj tufoj de plumoj de struto disiris, kvazaŭ ŝaŭmo blanka, al pala arĝento de freta tegmento. Ridanta Narciso de verda bronzo tenis polurigitan spegulon sur sia kapo. Sur la tablo estis ebena ujo de amatisto. Ekstere li povis vidi la kupolegon de la katedralo, brilantan kiel vezikon super ombraj domoj, kaj lacigitajn gardistojn paŝante tien kaj reen sur la nuban terason apud la rivero. Fore, en ĝardeno, kantis najtingalo. Subtila parfumo de jasmeno venis tra la fenestro. Li frotis siajn brunajn buklojn el sia fruto, kaj preninte liuton, lasis siajn fingrojn vagi tra la kordoj. Liaj pezaj palpebroj falis, kaj stranga malviglo venis al li. Neniam antaŭe li sentis tiom volante, aŭ per tiu altkvalita ĝojo, la magion kaj misteron de belaj aferoj.

Kiam noktomezo sonis el horloĝturo, li tuŝis sonorilon, kaj liaj paĝioj venis kaj senrobigis lin kun multe da ceremonio, verŝante rozakvon sur liajn manojn, kaj disŝutante florojn sur lian kusenon. Kelkajn momentojn post ilia foriro, li ekdormiĝis.

Kaj dormante li sonĝis sonĝon, kaj jen sonĝo lia. Ŝajnis al li, ke li staras en longa, malalta mansardo, inter la bruo de multaj teksmaŝinoj. La malabunda taglumo venis tra raspitaj fenestroj, kaj montris lin

maldikajn figurojn de tekslaboristoj klinantaj sur siaj skatoloj. Infanoj palaj kaj malsanaspektaj kaŭris inter larĝaj traboj.

Kiam la glitbobenoj rapidis tra la varpo, ili levigis la pezajn latojn, kaj kiam la glitbobenoj haltis, ili lasis la latojn fali kaj preme kunigis la fadenojn. Iliaj vizaĝoj estis morditaj de malsato kaj iliaj maldikaj manoj skuis kaj tremis. Kelkaj marasmaj virinoj sidiĝis je tablo kaj kudris. Horora odoro plenigis la lokon. La aero estis malpura kaj peza, kaj sur la muroj fluis malsekeco.

La juna reĝo alproksimiĝis al teksisto kaj staris apud li kaj orbservis lin.

Kaj la teksisto rigardis al li kolere, kaj diris «Kial vi rigardas al mi? Ĉu vi estas spiono sendita de nia mastro?»

«Kiu estas via mastro?», demandis la juna reĝo.

«Nia mastro!», kriis la teksisto amare, «estas homo same kiel mi. Ververe, estas nur diferenco inter ni du, ke li vestas per kvalitaj vestaĵoj, dum mi uzas ĉifonojn, kaj dum mi estas malforta pro malsato, li multe suferas pro tromanĝado».



«La lando estas libera», diris la juna reĝo, «kaj vi ne estas sklavo de homo».

«En milito», respondis la teksisto, «fortulo sklavigis malfortulon, kaj en paco riĉulo sklavigas malriĉulon. Ni devas labori por vivi, kaj ili donas al ni tian salajron, ke ni mortas. Ni laciĝas por ili la tutan tagon, kaj ili amasigas oron en siajn skatolojn, kaj niaj infanoj malaperas antaŭ sia tempo, kaj la vizaĝoj de tiuj, kiujn ni amas, iĝas duraj kaj perversaj. Ni paŝas sur la beroj, kaj alia homo trinkas la vinon. Ni semas maizon, kaj nia propra magazeno estas malplena. Ni havas ĉenojn, kvankam neniu okulo vidas ilin; kaj ni estas sklavoj, kvankam homoj nomumas nin liberaj».

«Ĉu tio estas tiel por ĉiuj?», li demandis.

«Tio estas tiel por ĉiuj», respondis la teksisto, «por junaj, kiel por maljunaj, por virinoj kiel por viroj, por geinfanoj kiel por tiuj frapitaj de jaroj. Komercistoj moligas nin, kaj ni devas do iliajn mendojn. Preĝisto rajdas kaj diras siajn preĝojn, kaj neniu zorgas pri ni. Tra niaj sensunaj stratetoj promenas Malriĉeco kun siaj avidaj okuloj, kaj Peko kun sia saturita vizaĝo sekvas proksime al ŝi. Mizero vekas nin matene, kaj Honto sidas kun ni nokte. Sed kion vi gravas pri tiuj aferoj? Vi estas neniu el ni. Via vizaĝo estas tro feliĉa». Kaj li forturniĝis malridante, kaj ĵetis la glitbobenon

tra la varpo, kaj la juna reĝo vidis, ke ĝi estis tredita per fadeno de oro.

Kaj granda teruro prenis lin, kaj li diris al teksisto, «Kia robo estas tiu, kiun vi teksas?»

«Ĝi estas la robo por la kronadp de la Juna Reĝo», li respondis. «Kion ĝi gravas al vi?»

Kaj la juna reĝo ekkriis laŭte kaj vekiĝis, kaj ve!, li estis en sia propra ĉambro, kaj tra la fenestro li vidis la granda miel-kolorigitan lunon pendi en pulva aero.

Kaj li denove ekdormiĝis, kaj sonĝis, kaj jen sia sonĝo.

Li pensis, ke li kuŝas sur planko de granda galero, kiuj estis remita de centoj da sklavoj. Sur tapiŝo apuda la mastro de la galero sidiĝas. Li estis nigra kiel ebono, kaj lia turbanto estis de karmezina silko. Grandaj ringoj de arĝento pendis peze de la loboj de liaj oreloj, kaj en liaj manoj li havis paron da eburaj pesiloj.

La sklavoj estis nudaj, escepte de ĉifonigitaj meztualoj, kaj ĉiu homo estis katenigita al najbaro. La varma suno punis ilin brile, kaj nigruloj kuris tien kaj reen laŭ la koridoreto kaj vipis ilin per vipetoj. Ili streĉis siajn maldikajn brakojn kaj tiris la pezajn remilojn tra la akvo. Vaporsalo flugis el remildorsoj.

Finfine ili venis en golfeton, kaj komencis sondi. Venteto flugis el marbordo, kaj kovris la ferdekon kaj la grandan latinvelon per subtila ruĝa pulvo. Tri araboj muntitaj sur sovaĝaj azenoj rajdis kaj ĵetis lancojn al ili. La galermastro prenis pentritan arkon kaj pafis arabon tra lia gorĝo. Li falis peze en la ondorompon, kaj liaj kunuloj forkuris. Virino vestita per vualo flava sekvis malrapide sur kamelo, rigardante dorsen fojfoje al mortanta korpo.

Tuj kiam ili ankoriĝis kaj senveliĝis, la nigruloj iris en la holdo kaj venigis longan ŝnurŝtupetaron peze ŝarĝita de plumbo. La galermastro ĵetis ĝin sur la flankon, fiksinte la finon al du feraj apogiloj.

Tiam la nigruloj prenis la plej junan sklavon kaj forprenis liajn kaptilojn el li,kaj plenumis siajn nazon kaj orelojn per vakso, kaj ligis grandan ŝtonon ĉirkaŭ lia talio. Li malsupreniris lace la ŝtupetaron, kaj malaperis en la maron. Kelkaj bobeloj supreniris tie, kie li submariĝis. Kelkaj aliaj sklavoj observis scivoleme super la bordo. Ĉe la pruo de la galero sidiĝis ŝark-kantisto, monotone frapante tamburon.

Post iom da tempo, la naĝisto supreniris en la akvo, kaj pendis el ŝtupareto kun perlo en sia dekstra mano. La nigruloj prenis ĝin el li, kaj ĵetis lin denove. La sklavoj ekdormis sur siaj remiloj.

Denove li venis kaj revenis, kaj ĉiun fojon li venigis kun pli belan perlon. La mastro de la galero pezis ilin, kaj metis ilin en saketon de verda ledo.

La Juna Reĝo provis paroli, sed lia lango ŝajnis esti gluita al la plafono de sia buŝo, kaj liaj lipoj rifuzis moviĝi. La nigruloj klaĉis unu la aliajn, kaj komencis kvereli pro stringo da brilaj bidoj. Du gruoj ĉirkaŭflugis la ŝipon ade.

Tiam la plonĝisto revenis lastfoje, kaj la perlo, kiun li prenis kun li estis pli bela ol perloj de Ormuz’, ĉar ĝia formo estis kiel luno, kaj ĝi estis pli blanka ol matenstelo. Sed lia vizaĝo estis srange pala, kaj kiam li falis sur la plankon, sango venis el liaj

oreloj kaj naztruoj. Li tremis kelkajn momentojn, kaj fine li malmoviĝis. La nigruloj movis siajn ŝultrojn kaj ĵetis la korpon super la bordon.

Kaj la mastro de la galero ekridis, kaj, streĉis sian brakon, prenis la perlon, kaj kiam li vidis ĝin li premis ĝin kontraŭ sia frunto, kaj kliniĝis. «Ĝi estos», li diris, «por la sceptro de la Junan Reĝon», kaj li signalis la nigrulojn repreni la ankron.

Kaj kiam la juna reĝo aŭdis tion, li ekkriis laŭte kaj vekiĝis, kaj tra la fenestro li vidis la longajn grizajn fingrojn de ektagiĝo paligi stelojn.

Kaj li ekdormis denove, kaj sonĝis, kaj jen sonĝo sia:

Ŝajnis, ke li vagadas tra arbaro densa, kun strangaj fruktoj kaj belaj venenaj floroj. Serpentoj fajfis al li kiam li pasis, kaj brilaj papagoj flugis kriante el branĉo al branĉo. Egaj testudoj kuŝis en la varma koto. Arboj estis plenaj da simioj kaj pavoj.

Li iris antaŭen, ĝis li atingis la bordon de la arbaro, kaj tie li vidis egan aron da homoj, kiuj penis en seka fundo de sekigita rivero. Ili svarmis en la sulko kvazaŭ formikoj.

Ili fosis profundajn putojn en la grundon kaj eniris ilin. Kelkaj el ili rompis rokojn per hakiloj; aliaj fosis en la sablon. Ili forprenis kaktusojn el ĝiaj radikoj, kaj paŝis sur la ruĝajn florojn. Ili rapidis, vokante unu la aliajn, kaj neniu pigrumis.

El malbrilo de kaverno Morto kaj Avido observis ilin, kaj Morto diris, «Mi estas laca; donu al mi triono da ili kaj lasu min iri».

Sed Avido kapneis. «Ili estas miaj servistoj», ŝi diris.

Kaj Morto diris al ŝi, «Kion havas vi en via mano?»

«Mi havas tri grejnojn de maizo», ŝi respondis; «kiel vi zorgas?»

«Donu al mi unu el ili», kriis Morto, «por ke mi plantu en mia ĝardeno, nur unu el ili, kaj mi foriros».

«Mi donos nenion al vi», diris Avido, kaj ŝi kaŝis sian manon en la faldo de sia vestaĵo.

Kaj Morto ridis, kaj prenis tason, kaj metis ĝin en flakon da akvo, kaj el ĝi venis Febro. Ŝi promenis tra la grana homamaso, kaj triono da ili ekmortis. Malvarma nebulo sekvis ŝin, kaj akvoserpentoj kuris flanke al ŝi.

Kaj kiam Avido vidis, ke triono da la amaso jam mortis, ŝi frapis sian bruston kaj ploris. Ŝi batis sian senfruktan sinon kaj kriis laŭte. «Vi mortigis trionon da miaj servantoj», ŝi kriis, «foriru. Estas milito en montoj de Tartario, kaj ambaŭ reĝoj vokas vin. Afganoj mortigis la nigran bovon, kaj ili marŝas en batalon.

Ili batis siajn ŝirmilojn per siaj lancoj, kaj ili uzas siajn ferajn kaskojn. Kion gravas mia valo al vi, ke vi restas en ĝi? Foriru, kaj neniam revenu».

«Ne», respondis Morto, «sed ĝis kiam vi donos al mi unu grejnon da maizo mi ne foriros».

Sed Avido fermis sian manon, kaj premis siajn dentojn. «Mi donos al vi nenion», ŝi flustris.

Kaj Morto ridis, kaj prenis nigran ŝtonon kaj ĵetis ĝin en la arbaron, kaj densejon de sovaĝa cikuto lasis Febro en robo de fajro.

Ŝi trapasis la amason kaj tuŝis homojn, kaj ĉiu homo tuŝita ekmortis. Herbo blankiĝis sub ŝiaj piedoj paŝante ŝi.

Kaj Avido tremis, kaj metis cindron je sia kapo. «Vi estas kruela», ŝi kriis, «vi estas kruela. Estas malsato en murigitaj urboj de Bharato, kaj akvujoj de Samarkando estas sekaj. Estas malsato en murigitaj urboj de Egiptio, kaj akridoj jam venis el dezerto. Nilo ne subakvis siajn bordojn, kaj preĝistoj malbenis Isis-on kaj Osiris-on. Foriru al tiuj, kiuj bezonas vin, kaj lasu min servantojn miajn».

«Ne», respondis Morto, «sed ĝis kiam vi jam donis al mi grejnon da maizon mi ne foriros».

«Mi donos al vi nenion», diris Avido.

Kaj Morto ridis denove, kaj fajfis tra siaj fingroj, kaj virino flugis en la aero. Plago estis skribita sur ŝia frunto, kaj amaso da senharaj vulturoj flugis ĉirkaŭ ŝi. Ŝi kovris la valon per flugiloj siaj, kaj neniu homo restis viva.

Kaj Avido forkuris kriante tra la arbaro, kaj Morto saltis sur sian ruĝan ĉevalon kaj forkuris, kaj irado lia estis pli rapida ol vento.

Kaj el la ŝlimo de la fundo de la valo venis drakoj kaj teruraj aferoj kun skvamoj, kaj ŝakaloj venis laŭ la sablo, ekflarante la aeron per siaj nazoj.

Kaj la Juna Reĝo ploris, kaj diris: «Kiuj estis tiuj homoj, kaj kion ili serĉis?»

«Rubenojn por krono de reĝo», respondis ulo apud li.

Kaj la Juna Reĝo ekpasis, kaj rondirante, li vidis homon vestitan kiel pilgrimon kun spegulo arĝenta en sia mano.

Kaj li paliĝis kaj diris, «por kiu reĝo?»

Kaj la pilgrimo respondis: «Rigardu en tiun ĉi spegulon, kaj vi vidos lin».

Kaj li rigardis en la spegulon kaj, vidante sian propran vizaĝon, li ekkriis laŭtege kaj vekiĝis, kaj brila sunlumo inundis sian ĉambron, kaj el arboj de la ĝardeno kaj ĝiaj ejoj birdoj kantis.

Kaj la Ĉambelano kaj altaj oficistoj de la Ŝtato envenis kaj honoris lin, kaj paĝioj venigis por li la robon de teksita oro, kaj metis la kronon kaj sceptro antaŭ li.

Kaj la Juna Reĝo rigardis al ili, kaj ili estis tre belaj.

Pli belaj estis ili ol io ajn, kion li iam vidis.

Sed li memoris siajn sonĝojn, kaj li diris al siaj nobeluloj: «Forprenu tiujn aferojn, ĉar ne mi uzos ilin».

Kaj la korteganoj estis surprizitaj, kaj kelkaj el ili ridis, ĉar ili pensis, ke li ŝercas.

Sed li parolis serioze al ili denove, kaj diris «Formetu tiujn aferojn, kaj kaŝu ilin de mi. Eĉ se estas la tago de mia kronado, mi ne uzos ilin. Ĉar en la teksilo de Bedaŭro, kaj la blanka mano de doloro estis mia robo teksita. Estas Sango en la koro de rubeno, kaj Morto en la koro de perlo». Kaj li diris al ili siajn tri sonĝojn.

Kaj kiam la korteganoj jam aŭdis ilin, ili rigardis unu la aliajn kaj flustris, dirante «Certe li ekfreneziĝis; ĉar kio estas sonĝo, sed sonĝo, kaj vizio sed nur vizio? Ili ne estas realaj aferoj, kiujn oni devas kredi. Kaj kial ni zorgu pri la vivoj de tiuj, kiuj

penas por ni? Ĉu homo ne manĝu panon se li ne jam vidis la semiston, aŭ drinku vinon ĝis kiam li jam parolis al vinberisto?»

Kaj la Ĉambelano parolis al la Juna Reĝo, kaj diris: «Mia sinjoro, mi preĝas vin meti tiujn nigrajn pensojn flanken, kaj vesti vian robon kaj meti tiun ĉi kronon sur vian kapon.

Ĉar kiel popolo scios, ke vi estas reĝo, se vi ne vestiĝas tiel, kiel reĝo?»

Kaj la Juna Reĝo rigardis al li. «Ĉu estas tiel?», li demandis. «Ĉu ili ne konos min kiel reĝon, se mi ne vestas tiel, kiel reĝo?»

«Ili ne konos vin, mia sinjoro», kriis la Ĉambelano.

«Mi kredis, ke estis homoj, kiuj estis reĝaj», li respondis, «sed povas esti tio, kion vi diras. Tamen, mi ne vestos tiun ĉi robon, aŭ estos kronigita per tiu ĉi krono, sed same kiel mi venis en tiun ĉi palacon mi lasos ĝin».



Kaj li ordonis ilin lasi lin, escepte de paĝion, kiun li konservis kiel kunanton. Knabo unu jaron pli junan ol li mem. Lin konservis lin por sia servo, kaj kiam li jam banis sin en klara akvo, li malfermis grandan pentritan keston, kaj el ĝi li prenis la ledan tunikon kaj la malglatan mantelon ŝafofelan, kiujn li estis vestinta kiam li gardis la kaprojn pigrajn de kapristo en monteto. Li vestis ilin, kaj en sia mano li prenis sian kapristan aferon.

Kaj la paĝieto malfermis sian grandan bluajn okulojn en miro, kaj diris, ridetante al li: «Mia sinjoro, mi vidas vian robon kaj sceptron, sed kie estas via krono?»

Kaj la Juna Reĝo prenis manplenon da sovaĝa dornarbo, kiu kreskis super la balkono, kaj turnigis ĝin kaj faris cirklon per ĝi, kaj metis ĝin en sian propran kapon.

«Tio estu mia krono», li respondis.

Kaj tiel vestita li pasis el sia ĉambro en la Grandan Halon, kie la nobeluloj atendas lin.

Kaj la nobeluloj festumis, kaj kelkaj kriis al li, «mia sinjoro, la popolo atendas reĝon, kaj vi montras ilin almozulon», kaj aliaj koleris, kaj diris, «li portas honton en nian ŝtaton kaj ne meritas esti nia mastro». Sed li respondis eĉ ne unu vorton, sed pasis kaj subeniris la brilan marmoran ŝtuparon, kaj preteriris la pordojn bronzajn, kaj muntis sian ĉevalon kaj rajdis al katedralo, la paĝieto kurante apud li.

Kaj la popolo ridis kaj diris, «Ĉu la arlekeno de la reĝo rajdas?», kaj ili primokis lin.

Kaj li haltis, kaj diris, «Ne, sed mi estas la Reĝo». Kaj li rakontis al ili siajn tri sonĝojn.

Kaj homo venis el la amaso kaj parolis amare al li, kaj diris, «Sinjoro, ĉu vi ne scias, ke el la lukso de riĉulo venas la vivo de malriĉulo? De via pompo ni estas manĝigitaj, kaj viaj malvirtoj donas al ni panon. Peni por malmola mastro estas maldolĉe, sed havi neniun mastron pripeni estas ankoraŭ pli amare. Ĉu vi opinias, ke korvoj manĝigos nin? Kaj kiun kuracon vi

havas por tiuj aferoj? Ĉu vi diros al aĉetanto, «Vi aĉetos por tiom multe», kaj al vendisto, «Vi vendos al tiu prezo?» Mi ne kredas tiel. Sekve, reiru en vian Palacon kaj surmetu vian purpuran kaj delikatan kostumon. Kion komunan havas vi al ni, kaj al kion ni suferas?»

«Ĉu ne riĉuloj kaj malriĉuloj estas gefratoj?», demandis la Juna Reĝo.

«Jes», respondis la viro, «kaj la nomo de la riĉa frato estas Kaino».

Kaj la okuloj de la Juna Reĝoj estis plenaj el larmoj, kaj li rajdis tra la murmuroj de la popolo, kaj la paĝieto ektimis kaj forlasis lin.

Kaj kiam li atingis la pordegon de la katedralo, la soldatoj ĵete blokis la vojon per siaj halebardoj kaj diris: «Kion vi serĉas ĉi tie? Neniu eniras ĉi tiun pordon, sed la reĝo».

Kaj lia vizaĝo ruĝiĝis per kolero, kaj li diris al ili, «Mi estas la reĝo», kaj flakenpuŝis la halebardojn kaj eniris.

Kaj kiam la maljuna Episkopo vidis lin veni en sia kostumo kaprista, leviĝis kun miro el sia trono kaj iris renkonti lin: «Mia filo, ĉu tio estas aspekto de reĝo? Kaj per kiu krono mi kronigos vin, kaj kiun sceptron mi devos meti en vian manon? Certe tiu ĉi devos esti tago de ĝojo, ne tago de humiligo».

«Ĉu Ĝojo devas vesti tion, kion Doloro modelis?», diris la Juna Reĝo. Kaj li diris al li siajn tri sonĝojn.

Kaj kiam la Episkopo estis aŭskultinta ilin, li kunigis siajn brovojn, kaj diris: «Mia filo, mi estas maljunan homon, kaj en la vintro de miaj tagoj, kaj mi scias, ke multajn aferojn oni faras en la larĝa mondo.

Sovaĝaj ŝtelistoj venas el montoj, kaj forprenas infanetojn kaj vendas ilin al maŭroj. Leonoj kuŝas atendante karavanojn, kaj saltas sur kamelojn. Sovaĝa apro manĝegas maizon en la valo, kaj vulpoj ronĝas vinberojn en la monteto. Piratoj atakas la marbordon kaj brulas la ŝipojn de fiŝistoj, kaj prenas iliajn retojn el ili. En salmarŝoj vivas lepruloj; ili havas domojn de kano, kaj neniu rajtas veni al ili.

Almozuloj vagas tra urboj, kaj havas sian manĝon kune kun hundoj. Ĉu vi povas malfari tiujn aferojn? Ĉu vi dormos kun leprulo, kaj gastigos almozulon en via tablo? Ĉu leono kontentigos vin kaj apro obeos vin? Ĉu tiu, kiu faris mizeron estas pli saĝa ol vi?

Sekve, mi ne gratulas vin pro tio, kion vi faras, sed mi petas vin rajdi denove en vian Palacon kaj ĝojigi vian vizaĝon kaj metu vin en vestaĵojn, kiuj konvenas al reĝo, kaj per la krono de oro mi kronigos vin, kaj la sceptron de perloj mi metos en vian manon. Kaj pri viaj sonĝoj, ne plu pensu pri ili. La pezo de tiu ĉi mondo estas tro granda por ke nur unu homo tenu ĝin, kaj la bedaŭro de la mondo tro peza por ke nur unu koro suferu ĝin».

«Ĉu vi diras tion en ĉi tiu domo?», diris la Juna Reĝo, paŝante preter la Episkopo, kaj suprenirante la ŝtupojn de la altaro, li staris antaŭ la imago de Kristo.

Li staris antaŭ la imago de Kristo, kaj en sia dekstra mano kaj en sia maldesktra estis la mirindaj vazoj de oro, la kaliko kun la flava vino, kaj la flakoneto kun la sankta oleo.

Li surgenuis antaŭ la imago de Kristo, kaj la grandaj kandeloj bruliĝis brile apud la juvela sanktejo, kaj la fumo de incenso buklis en maldikajn bluajn kronojn tra la kupolo. Li klinis sian kapon en preĝo, kaj preĝistoj en siaj malmolaj ĥormanteloj forglitis el altaro.

Kaj subite granda tumulto venis el ekstera strato, kaj envenis nobeluloj kun siaj glavoj en la manoj, kaj siaj movantaj plumoj, kaj ŝildoj de polurigita ŝtalo. «Kie estas tiu sonĝisto de sonĝoj?», ili kriis. «Kie estas tiu ĉi Reĝo, kiu vestas kiel almozulo, tiu ĉi knabo, kiu hontigas nian ŝtaton? Certe ni mortigos lin, ĉar li ne meritas regi super ni».

Kaj la Juna Reĝo klinis sian kapon, kaj preĝis, kaj kiam li estis fininta sian preĝon, li leviĝis, kaj turnante, li rigardis ilin triste.

Kaj ho!, tra la pentritaj fenestroj venis sunlumo abunde sur lin, kaj sunradioj teksis ĉirkaŭ li robon, kiu estis pli bela ol tiu robo, kiu estis farita por lia plezuro. La mortinta bastono ekfloris, kaj portis liliojn pli blankaj ol perloj. La seka dorno ekfloris, kaj portis rozojn, kiuj estis pli ruĝaj ol rubenoj. Pli blankaj ol delikataj perloj estis la lilioj, kaj liaj bazoj estis brila arĝento. Pli ruĝaj ol masklorubenoj estis la rozoj, kaj iliaj folioj estis batita oro.

Li staris tie en vestaĵo de reĝo, kaj la pordoj de la juvelita sanktejo ekmalfermiĝis, kaj el kristalo de multeradia hostimontrujo brilis mirinda kaj mistika lumo. Li staris tie en vestaĵoj de reĝo, kaj la Gloro de Dio plenigis la lokon, kaj la sanktuloj en siaj skulptitaj niĉoj ŝajnis movi.

En bela kostumo de reĝo li staris antaŭ ili, kaj orgeno verŝis sian muzikon, kaj trumpetistoj blovis siajn trumpetojn, kaj knabokantistoj kantis.

Kaj la popolo falis surgenue kun miro, kaj nobeluloj reingis siajn glavojn kaj pagis honoron, kaj la vizaĝo de la Episkopo paliĝis, kaj liaj manoj tremis. «Iu pli grava ol mi kronigis vin!», li kriis, kaj li surgenuis antaŭ li.



Kaj la Juna Reĝo malsupreniris el la alta altaro, kaj trapasis inter la popolo. Neniu homo kuraĝis rigardi lian vizaĝon, ĉar ĝi estis kiel vizaĝo de anĝelo.


**Oscar Wilde**

# La faraono

*Ĉapitro 22ª*

La ĉeestado en la nomeso Aa tiel lacigis la kronprincon, ke por ripozi kaj kolekti la pensojn, li ordonis ĉesigi ĉiujn festenojn por sia honoro, kaj malpermesis, ke la loĝantaro ie iru renkonte por saluti lin.

La princa sekvantaro miris, eĉ trovis tion nekonvena. Sed la ordono estis plenumita, kaj Ramzes retrovis iom da trankvilo en la vivo. Nun li havis tempon por ekzerci la soldatojn, kio estis lia plej amata okupo, kaj povis iom kolekti siajn senordajn pensojn.




Fermita en la plej malproksima angulo de la palaco, la princo komencis mediti: kiom li plenumis la ordonon de l' patro?

Li esploris la nomeson Aa per propraj okuloj: ĝiajn kampojn, urbetojn, loĝantojn kaj oficistojn. Li kontrolis la fakton, ke la orientan parton de l' provinco invadis la dezerto. Li rimarkis, ke la laboristaro estas indiferenta kaj malsaĝa, ke ĝi faras nur tion, kion oni ordonas al ĝi, kaj eĉ tion ne-volonte. Fine li konvinkiĝis, ke vere fidelajn kaj amantajn regatojn oni povas trovi nur inter la aristokratio. Ĉar iliaj membroj estas aŭ parencoj de la gento de l' faraonoj, aŭ apartenas al la klaso de l' militistoj kaj estas nepoj de l' soldatoj, kiuj batalis sub Ramzes Granda.

En ĉiu okazo, ĉi tiuj homoj estis sinceraj partianoj de l' dinastio kaj estis pretaj servi al ĝi kun vera fervoro. Ne kiel la kamparanoj, kiuj kriinte la saluton, plej rapide kuris al siaj porkoj kaj bovoj.


Sed la ĉefa celo de la vojaĝo ne estis atingita. Ramzes ne nur ne vidis klare la kaŭzojn de la malgrandiĝo de la reĝaj enspezoj, sed eĉ ne sciis formuli la demandon: de kie venas la malbono kaj kiel ĝin forigi? Li sentis nur, ke la legenda batalo de l' dio Set kontraŭ Oziriso klarigas nenion kaj ne montras rimedon.

Kaj la princo, kiel estonta faraono, volis havi grandajn enspezojn, kiajn havis la antaŭaj monarĥoj de Egipto. Li do bolis de kolero ĉe la sola penso, ke suririnte la tronon li povos esti

same malriĉa, kiel la patro, aŭ eble ankoraŭ pli malriĉa.

—Neniam!...— kriis la princo, kunpremante la pugnojn.

Por pligrandigi la reĝajn trezorojn li estis preta sin ĵeti kun glavo sur la dion Set mem kaj distranĉi lin en pecojn, kiel la dio faris kun sia frato Oziriso. Sed anstataŭ la senkompata dio kaj liaj legionoj li vidis ĉirkaŭ si: malplenon, silenton kaj nescion.



Sub la influo de ĉi tiuj disputoj kun la propraj pensoj, li komencis foje interparoladon kun la ĉefepiskopo Mefres.

—Diru al mi, sankta patro, kiu konas ĉiujn saĝojn, kial la ŝtataj enspezoj malgrandiĝas kaj kiel oni povus pligrandigi ilin?

La ĉefepiskopo levis la manojn al la ĉielo.

—Estu benata— ekkriis li— la spirito, kiu diris en vian orelon, alta sinjoro, tiajn pensojn!... Ho, se vi imitus la grandajn faraonojn, kiuj kovris Egipton per temploj, kaj per kanaloj kaj akvobaroj pligrandigis la fruktodonajn kampojn!...

La maljunulo estis tiel kortuŝita, ke li ekploris.

—Antaŭ ĉio— diris la princo— respondu mian demandon. Ĉar ĉu oni povas pensi pri konstruado de kanaloj kaj temploj, se la trezorejo estas malplena? Sur Egipton falis la plej granda malfeliĉo: ĝiajn monarĥojn minacas la mizero. Tion antaŭ ĉio oni devas esplori kaj rebonigi, kaj la cetero mem troviĝos.

—Pri tio, princo, vi ekscios nur en la temploj, ĉe la piedo de la altaroj— diris la ĉefepiskopo.— Nur tie via nobla scivolo povas esti kontentigita.

Ramzes faris malpaciencan movon.

—Antaŭ la okuloj de via ekscelenco la temploj kovras kaj kaŝas la tutan landon, eĉ la trezorejon de l' faraonoj!... Mi ja estis lernanto de l' pastroj, mi estis edukita en la ombro de l' temploj, mi konas la misterajn spektaklojn, en kiuj vi prezentas la koleron de Set, la morton kaj reviviĝon de Oziriso, kaj kia utilo de tio?... Kiam la patro demandos min: kiel plenigi la trezorejon?— mi respondos nenion. Eble nur mi konsilos al li ankoraŭ pli longe kaj ofte preĝi, ol nun!

—Vi blasfemas, princo, ĉar vi ne konas la altajn misterojn de la religio. Se vi ekkonus ilin, vi respondus multajn demandojn, kiuj turmentas vin, Kaj se vi vidus, kion mi vidis!... Vi ekkredus, ke la plej grava afero por Egipto estas relevi ĝiajn pastrojn kaj templojn...

—La maljunuloj duan fojon en la vivo fariĝas infanoj— pensis la princo kaj interrompis la diskutadon.

La ĉefepiskopo Mefres estis ĉiam tre pia, sed en la lasta tempo ĝis malsaĝeco.

—Mi multe gajnus— diris al si Ramzes— se mi donus min en la manojn de l' pastroj por asisti iliajn infanajn ceremoniojn. Eble Mefres ankaŭ al mi ordonus stari tutajn horojn antaŭ la altaro kun levitaj manoj, kiel li faras mem, atendante miraklojn!...

En la monato Farmuti (fino de januaro, komenco de februaro) la princo adiaŭis Otoeson, por transiri en la nomeson Hak. Li dankis la nomarĥon kaj la sinjorojn pro la belega akcepto, sed en la koro li havis malĝojon, ĉar li sentis, ke li ne sukcesos plenumi la taskon, per kiu lin ŝarĝis la patro.



Kondukita de la familio kaj kortego de Otoes, la vic-reĝo transveturis sur la dekstran bordon de Nilo, kie salutis lin la nomarĥo Ranuzer, la sinjoroj kaj pastroj. Kiam la princo haltis sur la tero Hak, la pastroj levis supren la statuojn de la dio Atmu, la patrono de l' provinco, la oficistoj falis sur la vizaĝon, kaj la nomarĥo petis lin kiel la anstataŭanton de l' faraono komenci la rikolton, ĉar en tiu sezono oni devis rikolti la hordeon.

Ramzes akceptis la rikoltilon, detranĉis kelke da plenmanoj kaj bruligis ilin kun incenso antaŭ la dio, gardanta la limojn. Post li faris la samon la nomarĥo kaj grandaj sinjoroj, fine komencis la rikolton la kamparanoj. Ili kolektis nur la spikojn, kiujn ili pakis en sakojn; la pajlo restis sur la kampo.

Aŭskultinte la diservon, kiu enuigis lin, la princo stariĝis sur durada veturilo. Antaŭe iris taĉmento de soldatoj, post ili pastroj, du sinjoroj kondukis la ĉevalon de l' princo per la bridoj. Post la kronprinco, en alia veturilo sidis la nomarĥo Ranuzer, kaj post li granda sekvantaro de sinjoroj kaj kortegaj servistoj. La popolo, konforme al la volo de Ramzes, ne aperis; sed la kamparanoj, laborantaj sur la kampoj, vidante la procesion, falis vizaĝe teren.

Tiamaniere, transirinte kelke da ŝippontoj, ĵetitaj sur la brakojn de Nilo kaj sur la kanalojn, la princo antaŭ la vespero atingis la urbon Anu, ĉefan en la provinco.

Kelke da tagoj daŭris la salutaj festenoj: oni honoris la princon, prezentis al li oficistojn. Fine Ramzes postulis, ke oni interrompu la festenojn kaj petis la nomarĥon, ke li montru al li la riĉaĵojn de la provinco.

La revuo komenciĝis en la sekvinta tago kaj daŭris kelke da semajnoj. Ĉiutage en la palacan korton, kie loĝis la kronprinco, venis diversaj metiistaj korporacioj, komandataj de siaj oficiroj, por montri al la princo siajn produktojn.

Do unuj post aliaj venis fabrikantoj de armiloj kun glavoj, lancoj kaj hakiloj; fabrikantoj de muzikaj instrumentoj kun fajfiloj, trumpetoj, tamburoj kaj harpoj. Post ili venis la granda korporacio de lignaĵistoj, kiu montris seĝojn, tablojn, kanapojn, portilojn kaj veturilojn, ornamitajn per riĉaj desegnaĵoj, inkrustitajn per diverskolora ligno, perlamoto kaj eburo. Poste oni portis metalajn vazojn kuirejajn: kradojn por la

fornoj, turnrostilojn, dutenilajn potojn kaj platajn patojn kun kovriloj. Juvelistoj malvolvis mirakle belajn orajn ringojn, braceletojn por manoj kaj piedoj el *electrum*, kunfandaĵo de oro kaj arĝento; ĉio ĉi estis arte skulptita, inkrustita per multvaloraj ŝtonoj aŭ per diverskolora emajlo.


Potistoj fermis la marŝon, portante preskaŭ cent specojn de argilaj vazoj. Estis tie potoj, pladoj kaj kruĉoj de plej diversa formo kaj grando, ornamitaj per pentraĵoj, per kapoj bestaj kaj birdaj.

Ĉiu korporacio faris al princo oferon de siaj plej belaj produktoj. Ili plenigis grandan salonon, kvankam ne ekzistis inter ili eĉ du similaj objektoj.

Post la fino de la bela, sed laciga ekspozicio, Ranuzer demandis la princon, ĉu li estas kontenta?

La princo ekmeditis.

—Pli belajn objektojn mi vidis eble nur en la temploj, aŭ en la palacoj de mia patro. Sed ĉar ilin povas aĉeti nur riĉaj homoj, mi ne scias, ĉu la ŝtata trezorejo havas de ili grandajn enspezojn.



La nomarĥon mirigis la indiferenteco de la juna princo al la verkoj de l' arto, kaj maltrankviligis lia zorgo pri la enspezoj. Volante tamen kontentigi Ramzeson, li komencis de tiu momento montri al li la reĝajn fabrikojn.

Ili do vizitis la muelejojn, kie la sklavoj en kelkcento da mueliloj kaj pistiloj preparis la farunon. Ili estis en la bakejoj, kie oni bakis panon kaj biskvitojn por la armeo, en la fabriko, kie, oni faris konservaĵojn el fiŝoj kaj viando.

Ili vizitis grandajn tanejojn kaj stablojn de sandaloj, fandejojn, kie oni fandis bronzon por vazoj kaj armiloj, poste brikejojn, stablojn de teksistoj kaj tajloroj.

Ĉi tiuj ejoj estis en la orienta parto de l' urbo. Komence Ramzes scivole rigardis ilin, sed baldaŭ tedis lin la aspekto de la laboristoj, kiuj estis timigitaj, malgrasaj, havis malsanemajn mienojn kaj sur la dorsoj signojn de la bastonoj.

De tiu momento li ne longe restadis en la fabrikoj; li preferis rigardi la ĉirkaŭaĵojn de l' urbo Anu. Malproksime, oriente, oni vidis la dezerton, en kiu en la pasinta jaro estis la manovra batalo inter li kaj Nitager. Kvazaŭ sur la manplato li vidis la ŝoseon, sur kiu marŝis tiam liaj regimentoj, la lokon, kie pro la skaraboj la militaj maŝinoj devis turniĝi sur la dezerton, eble eĉ la arbon, sur kiu pendigis sin la kamparano, fosanta la kanalon...

Akompanata de Tutmozis, de la supro, tie li rigardis la florantan teron Gosen kaj malbenis la pastrojn. Kaj tie, inter la montetoj, li renkontis Saran, por kiu ekflamis lia koro.

Hodiaŭ, kia ŝanĝo!... Li jam ĉesis malami la pastrojn, de l' tempo kiam dank' al Herhor li ricevis la korpuson kaj estis proklamita vic-reĝo. Sara fariĝis indiferenta por li kiel amatino, kaj pli kaj pli okupis lin la penso pri la infano, kies patrino ŝi estis fariĝonta.

—Kion ŝi faras tie?— pensis la princo.— Jam de longe mi ne havis novaĵojn de ŝi.

Kaj kiam li tiel rigardis la orientajn altaĵojn, rememorante la nemalproksiman estintecon, Ranuzer, kiu estis ĉe la fronto de la sekvantaro, estis certa, ke la princo

rimarkis ian malhonestaĵon en la fabrikoj kaj meditas, kiel lin puni.

—Mi dezirus scii, kion li rimarkis?— parolis al si la respektinda nomarĥo.— Ĉu tion, ke duonon da brikoj oni vendis al la feniciaj komercistoj, aŭ ke dek mil sandaloj mankas en la magazeno, aŭ eble ia malnobla fripono murmuretis al li en la orelon pri la metalaj fandejoj?...

Kaj granda maltrankvilo plenigis la koron de Ranuzer.

Subite la princo sin turnis al la sekvantaro kaj alvokis Tutmozison, kiu devis ĉiam esti proksime de lia persono.

Tutmozis alkuris. La princo iris kun li flanken.

—Aŭskultu— diris li, montrante la dezerton.— Ĉu vi vidas ĉi tiujn montojn?...


—Ni estis tie en la pasinta jaro— eksopiris la kortegano.

—Mi rememoris Saran....

—Mi tuj bruligos incenson por la dioj!— ekkriis Tutmozis— ĉar mi jam pensis, ke de l' tempo, kiam vi estas vic-reĝo, via ekscelenco forgesis pri viaj fidelaj servistoj...

La princo ekrigardis lin kaj levis la ŝultrojn.

—Elektu— diris li— el la donacoj, kiujn oni oferis al mi, elektu kelke da plej belaj vazoj, mebloj, teksaĵoj, kaj antaŭ ĉio braceletojn kaj teksaĵojn, kaj portu tion al Sara.



—Vivu eterne, Ramzes— murmuretis la elegantulo— ĉar vi estas nobla sinjoro!

—Diru al ŝi— daŭrigis la princo— ke mia koro ĉiam estas plena de favoro por ŝi. Diru, ke mi volas, ke ŝi gardu sian sanon kaj zorgu pri la infano, kiu devas veni en la mondon. Kiam proksimiĝos la tempo de la akuŝo, kaj mi plenumos la ordonojn de mia patro, diru al Sara, ke ŝi venos al mi kaj ekloĝos en mia domo. Mi ne povas toleri, ke la patrino de mia infano sopiru en la soleco... Veturu, faru, kion mi diris, kaj revenu kun bonaj novaĵoj.

Tutmozis falis sur la vizaĝon antaŭ la nobla monarĥo kaj tuj forveturis. La sekvantaro de l' princo, ne povante diveni la enhavon de la interparolado, enviis al Tutmozis la favorojn de l' sinjoro, kaj la respektinda Ranuzer sentis pligrandiĝantan maltrankvilon en sia animo.

—Ne bezonu mi— diris li, plena de maltrankvilo— levi mian manon kontraŭ mi mem kaj en floranta aĝo orfigi mian domon!... Kial, malfeliĉa, mi ne pensis pri la horo de l' juĝo, proprigante al mi la propraĵon de lia sankteco?...

Lia vizaĝo fariĝis flava kaj liaj genuoj tremis. Sed la princo, okupita de la fluo de l' rememoroj, ne rimarkis lian timon.

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPRANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO**

Tfn° (00 34) 615 427 143

**Retskribu al jesuo@ono.com**

http://www.gazetotekolanti.com/hale/k76.pdf




**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**

ISSN 1697-6460